

# BONA ESPERO

REVUO DE  
SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

VOLUMO: 1985/22  
NUMERO: 4

ISSN 0006-7024

Wedersydse begrip deur  
**ESPERANTO**  
die interetniese taal

Understanding through  
**ESPERANTO**  
the inter-ethnic language

Compreensão pelo  
**ESPERANTO**  
a língua inter-étnica

تفاهم به وسيله  
اسپرانټو  
زبان فونق ملي

Porozumienie z pomocą  
**ESPERANTO**  
języka międzynarodowego

РАЗБИРАТЕЛСТВО ЧРЕЗ  
МЕЖДУНАРОДНИЯ ЕЗИК  
ЕСПЕРАНТО

Se comprendre grâce à  
**l'ESPÉRANTO**  
la langue inter-ethnique

Suhtlemine rahvusvahe-  
lise keele  
**ESPERANTO**  
abil

Förståelse genom  
**ESPERANTO**  
det inter-etniska språket

Αλληλοκατανόηση μέσω της  
**ΕΣΠΕΡΑΝΤΟ**  
της διεθνούς γλώσσας

ДІЯВІ ПІСНІ ПІПІ  
كۆچمەكەتە  
ئىشەنچ قۇيۇش-ئىشەنچ

Uluslararası dil  
**ESPERANTO**  
ile anlaşma

Megérta egymást az  
eszperantó  
közvetítő inter-etnikus  
nemzetközi nyelv révén

Verstehen durch  
**ESPERANTO**  
die interethnische Sprache

인류공통어  
에스페란토를 통한  
상호이해

Comprendersi  
con l'Esperanto  
la lingua Interetnica

Sapraššanās  
starptautiskajā valodā  
esperanto

Intelegere prin  
**ESPERANTO**  
limba interetnică

BONA ESPERO

Revuo de la Sudafrika Esperanto-Asocio [SEA]

Redaktono: S-ro Cobus Zeelie

Subredaktonino: S-ino Adèle Fouché

Redakcia Adreso: Postbus 12271, Centrahil, Port Elizabeth, 6006 Suda  
Afrika / South Africa / Sudafriko

Kunlaborantoj: S-ro S de Waal ..... Natalo  
S-ro F M Woolf ..... Okcidenta Kablando  
S-ino A K Fouché ..... Orienta Kablando  
S-ro J de Klerk ..... Okcidenta Transvalo  
S-ro H W Appel ..... Orienta Transvalo  
Vakantaĵo ..... Oranĝa Libenŝtato  
S-ro Z Boglari ..... Svaŝilando  
S-ro J Hammes ..... Universitatoj

Kontribuaĵoj: Ori sendu al la Redaktono aŭ Kunlaboranto en sia  
landparto. Kontribuaĵoj plivole estu maŝinskribi-  
taĵ. Manuskriptoj nepublikigitaj neresendiĝos.  
Nek la Redakcio nek SEA respondecas pri la enhavo  
de anoncoj kaj promesoj faritaj en ili.

Prezo: Membroj de SEA ricevas la revuon senpage. Membru-  
oj alonu pere de la SEA Kasisto, P O Box 1227,  
Cape Town, 8000 South Africa / Sudafriko

Estraro de SEA: Prezidanto - S-ro E de Kock  
Vicprezidanto - S-ro A von Blottnitz  
Sekretario - S-ro O Sher  
Kasisto - S-ro C S Beckford  
Komitatanoj - S-ro H W Appel  
S-ino A K Fouché  
S-ro J Hammes  
D-ro J van D Strydom  
S-ro F M Woolf  
S-ro J J Zeelie

Adreso de SEA: La Sekretario, Sudafrika Esperanto-Asocio,  
Bronkhorststraat 75, Groenkloof, Pretoria,  
0181 Suid-Afrika / South Africa / Sudafriko

## ĈEFARTIKOLO

Antaŭparolo al *Kvin Elementoj* (B Ragnarsson) 1

## ARTIKOLOJ KAJ RAKONTOJ

Efika kuracilo Haronga (Ensendis A von Blottnitz)	3
Vortoj de la redaktoro (C Zeelie)	4
Jarkunveno de la SEA	5
Tezoj pri Esperanto tra la mondo	6
Grafika reprezento pri la oficiala instruado de Esperanto en la mondo	7
Esperanto apud "Vaalbult" (A von Blottnitz)	8
Favormortigo	9
Kotizoj/Abonoj por 1986	11
La unua poŝtmarko	11
Letero en <i>Monato</i>	11
Fiera bilanco	11
Nova kategorio de UEA membreco	16
Pri kiuj ni celigas niajn penojn disvastigi Esperanton?	16
Novaj ideoj pri la malapero de la dinosaŭroj	18
<i>Ĥanukah</i> (O Sher)	21
Esperanto-objektoj en Sudafriko (A von Blottnitz)	22
Testo: Ĉu vi estas kolektanto aŭ papilio? (A Brennan kaj R Corsetti)	23
El la libro de Jesaja (Rozo David)	29

## RUBRIKOJ

Pensetoj el l'vivo	8
El nia poezio ( <i>Vagonvojaĝo</i> - T Carr)	14
Ridetu	14
El la scienco	19
Inter ni....	25
Leteroj al la redaktoro	4, 28
Venteraĵoj (E S Venter)	31
Trilingva artikolo	33
L'inpoto (Por korespondemuloj)	37

ANONCOJ 33

KONKURSO 34

## ĈEFARTIKOLO

Edwin de Kock estas unu el la plej rimarkindaj poetoj de nia juna generacio. Per sia unua libro kaj precipe per la unika poemego *Kvin Elementoj* li senhezite eniras la trian stadion de nia literaturo, la stadion de analizo, por akceli nian kulturen progreson laŭ la neŝanceblebla paŝado de la evoluo. Ke li eklernis Esperanton antaŭ nur tri jaroj, devas mirigi kaj admirigi nin pri liaj neordinaraj kapabloj. Tiu fakto - krom lia junaĝo (28 jaroj) - estas atentinda, kiam oni konsideras tion, kion li jam atingis, kaj cerbumas pri liaj eventualaj farotaĵoj sur la larĝa bazo de *Kvin Elementoj*. Tiu ĉi poemego, majesta en sia amplekso, fekunda en sia simtologio, honesta en sia vizio, kun ĉiuj siaj malkonformaĵoj apartenas al tiuj malmultaj poemoj en nia literaturo, kiuj antaŭ ĉio atestas tiun celkonscian kuraĝon, kiu karakterizas la majstropeeton. *Kvin Elementoj* havas tion komunan kun *La Infana Raso*, ke ĝin konsistigas ion fragmentecaj, diverstemaj kaj diversteknikaj poemoj, sed ĝi estas ankaŭ unuaĵo kunligita de ĉiam revenaj temoj kaj aludoj. Ekzemple, ĉiu sekcio enhavas bildojn el antikva urbo, kiu cetere povas esti konsiderata kiel simbolo de nia civilizo. Samtempe la variaĵa komplikeco de la poemego simbolas ion streĉe interesan el psikologia vidpunkto, nome la funkciadon mem de la kverocedo, kiel ĝi transcende disvolviĝas en la peranta menso de granda poeto. Se ni ne tute fremdas al poeto sperto, ni scias, ke la vortespriaj rezultoj de la plej alta kreprocedo neniam povas esti tute klaraj, ĉar la esprimovo de la vortoj estas limigita: venas momentoj, kiam por poeto la esprimo plej proksima al lia vizio estas simpla kaj senvorta a-a-a. La senperfekteco de la parolo ne tiomekstreme sufokis la kanton de Edwin de Kock, sed ĝi plurfoje muldis lian esprimadon ĝis la dialekto de la subkonscio. Kompreni ĝisfunde poemon, kia estas lia *Kvin Elementoj*, sinonimas intiman partoprenon en la mentaleco de la poeto dum la tempo de kreado, kaj "penetri tiun ĉambron" kiu povas? Restas la alternativo ensorbi la poemon impresionisme, kvazaŭ muzikon; tiuj pli prifaktemaj devas kontentigi je tio, kion diras al ili la vortoj.....

"Kvazaŭ muzikon", mi diris. Edwin de Kock verkas por la orelo; li havas siajn proprajn, ellaboritajn ideojn pri la prozodio. Inter jamoj kaj trokeoj li ne akre distingas, sed ilin miksas, laŭ opinio, ke el parola vidpunkto tia efeko ofte estas pli kontentiga. Al tiuj rekonantaj nur la tradiciajn ritmojn liaj versoj ofte nepre efikas kiel stumblaj, sed post alkutimiĝo ili certe ankaŭ rekonos lian nekonformecan teknikon. Li multe kaj efike aplikas la senriman versadon kaj tiel faras tre plaĉan

benon al la oreloj, kiujn tro ofte surdigas la rimvortaj tintoj ĉe niaj poetoj. En kelkaj siaj mallongaj poemoj li tamen montras, ke li ankaŭ bonege regas la arton de rimado kaj la fiksaĵajn formojn kiel la soneton kaj la rondelon. Ĉu lia Vilanelo estas la sola en nia literaturo?

Edwin de Kock ne estas facila poeto. La simboloriĉo de liaj poemoj, iliaj kompakteco kaj originaleco, estas tre neordinaraj kaj metas ilin en la vicon de la avangarda trupo de niaj poetoj. Tamen eble estas la honesta integreco kaj tre malfalsa tono, tiel esence ligitaj al liaj poemoj, kiuj antaŭ ĉio nin ravas. Kaj ni konscias, ke malgraŭ la fakto, ke li certe apartenas al la "tria stadio" en la poezi-evoluo, lia emociriĉa animo daŭre pulsigos liajn analizecajn versojn, ĉiam savante lin de la danĝero de poezia amnezio. Edwin de Kock: pri li ni povas esti certaj, ĉar li devas kanti!

Baldur Ragnarsson, Reykjavik (1958) [Daŭrigata el la antaŭa numero 1985/22/3. La fina parto]

#### EFIKA KURACILO HARONGA

Haronga (Harungana) aŭ *Haronga madagascariensis* estas arbo el kiu oni pretigas medikamenton por skabio kaj disenterio. Lastatempe la malagasa akademio publikigis komunikon pri la efiko de ĝi en la medicina kuracado de la gastroduodena (=stomaka) ulcero. Haronga kreskas en Malagasio, Gineo, Kameruno, Senegalio, Aŭstralio. La antaŭaj esploradoj - cele klarigi la kemiajn entenaĵojn de la planto - estis efektivitaj de du ekipoj: unuflanke, la preparaj provoj de la Farmacia Fakultato de Parizo konkludis pri la estiĝo de polifenoloj kaj de kinonoj kaj pri la forestiĝo de alkaloidoj, Aliflanke, D G Buckley kaj kolegoj (aŭstraliaj aŭtoroj) trovis en Haronga betasitosterolon, kersetolon, malagaskarinon (kolora pigmento) kaj substancon "aertefarit-diisopropilo" 4,4-dikonbanilatan metilon.

Je medicina nivelo - rilate al serio da 110 kazoj de mal-sanuloj de gastroduodenaj ulceroj - la aŭtoroj de la komunikoj prezentas preparan studon pri la terapia intereso de

#### GRAVA INFORMO - NOVA RUBRIKO!

SUR PAĜO 24 VI VIDOS LA UNUAN DE TUTNOVA RUBRIKO. LA NOMO DE LA RUBRIKO ESTAS INTER NI..... LA ESPERANTISTOJ DE SUDAFRIKO ESTAS TRE DISGITAJ TRA LA LANDO KAJ PLEJ OFTE UNU NE SCIAS PRI LA AGADOJ DE LA ALIAJ. ĈI TIU RUBRIKO DONOS AL LA SUDAFRIKAJ SAMIDEANOJ TRE UTILAN SERVON NOME INFORMI AL LA ESPERANTISTOJ PRI KIO FARAS LA PERSONOJ EN LA DIVERSAJ LANDPARTOJ. TIUMANIERE ĜI SERVOS ANKAŬ KUNIGI LA IZOLITAJN SAMIDEANOJN. LA RUBRIKO ESTAS POR VI, LA LEGANTO. DO UZU ĜIN BONE!!!! NEPRE INFORMU LA REDAKTORON SE VI SCIAS PRI IO EL LA JENAJ:

1: IU AJN ESPERANTAĴO 2: SAMIDEANO, KIU VIZITIS/AS/OS VIN AŬ VIAN ASOCION/SOCIETON/KLUBON 3: LETERO/ARTIKOLO PRI E. EN NEESPERANTISTA GAZETO 4: LETERO AŬ ARTIKOLO, KIU APERIS EN EKSTERLANDA ESPERANTISTA GAZETO 5: IO AJN, KION VI VOLAS AĈETI AŬ VENDI (KONDICE KE ĜI DEVAS ESTI ESPERANTAĴO) 6: IU AJN AGADO RILATE ESPERANTON 7: KAJ TIEL PLU..... MI RIPETU - UZU KAJ UTILIGU ĈI TIUN RUBRIKON. EBLE, SE NI KUNE STAROS/AGADOS/LABOROS NI TIUMANIERE PLI EFIKE KAJ CELTRAFFE DISVASTIGOS ESPERANTON. RILATE LA RUBRIKON, ĈIU PERSONO KIU LEGAS NIAN REVUON DEVAS ESTI KUNLABORANTO. NI KUNIGU NIAJN FORTOJN KIEL SAMIDEANOJ. NEPRE AGU!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

NIA REDAKTORO REZIGNAS

*Estas kun granda bedaŭro, ke ni adiaŭas nian redaktoron, s-ron J J Zeelie (Cobus), kiu rezignas sian oficon post la eliro de ĉi tiu, do lia lasta umero de BONA ESPERO.*

*S-ro Zeelie ne havis kialon por ekŝi el kio por li estis sinofera laboro, sed anstataŭe motivon, nome, doktoriĝi en sia aparta fako, la farmacio. Nenecese diri, ke por tio li bezonas tiom da tempo, ke li devas vole nevole flankenmeti ĉiujn kromokupojn, inkluzive de la redaktorecon. Tamen, li al ni estos tute perdita. Liaj klopodoj por kaj intereso en la disvastiĝo de nia lingvo estos direktataj al ĝia instruado ĉe la Portelizabeta Teknikono kie li, cetere, dum la lastaj tri monatoj verŝis la verdan lumon sur 20 personojn, kaj tiel debutigis Esperanton en Sudafriko kiel studobjekton en publika institucio. Li sukcesis projekti sian personan humursencon en la paĝojn de nia, de li teknike bonproduktita revuo.*

*Al li ni ŝuldas niajn korajn dankojn pro tasko bone elfarita.*

F.M.W.

VORTOJ DE LA REDAKTORO

En 1983, malgraŭ grava tempomanko en mia ĉiame agadoplena vivo, mi akceptis la taskon redakti nian revuon BONA ESPERO. Post 10 numeroj kaj pli ol du jaroj, mia tempomanko fariĝis tiel kritika, ke mi nevole devas sciigi, ke ekde 1986 ne plu estos al mi eble redakti la revuon. Tio kompreneble ne signifas, ke Esperanto perdos min. Tute male! Anstataŭ redakti, mi okupos min instruante la lingvon ĉe la Portelizabeta Teknikono kaj interesiĝos pri aliaj Esperantaj aferoj, kiel 1) Esperanto en Afriko, 2) la Jubilea Memolibro, 3) aliaj Asociaj aferoj kaj 4) kunlaboranto por nia revuo.

(→ p 6)

JARKUNVENO DE LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

La 22-a jarkunveno de la Asocio okazos dimanĉon la 23-23-an de marto 1986 je 14h30 ĉe s-ro H W Appel, 8 St. Michael Road, New Redruth, Alberton 1450 [011-8694031].

Tagordo:

1. Antaŭa protokolo kaj traktado de aferoj estiĝantaj el ĝi.
2. Raporto de la Prezidanto.
3. Raporto de la Sekretario kaj pritraktado de korespondaĵoj.
4. Raporto de la Kasisto.
5. Elekto de nova Estraro.
6. Aliaj aferoj.

Oni sendual Oskaro Sher, kiel eble plej frue, nomojn de membroj, kiujn oni deziras proponi por elekto al la nova komitato/estraro kun ties konsento agi se elektitaj. La nunaj komitatanoj estas petataj informi lin ĉu aŭ ne ili konsentas al refoja elekto por plua jaro.

Membroj, kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon estas petataj ensendi siajn komentojn, opiniojn k.t.p. por ke oni povu pritrakti ilin sub la ĉi-supra ero 3. Speciale bonvenaj estas raportoj pri la Esperanto-agado de la diversaj grupoj tra la lando.

La Prezidanto, Estraro kaj ĉiuj Komitatanoj deziras al niaj membroj kaj aliaj legantoj de BONA ESPERO feliĉan kaj prosperan novan jaron, en bona sano kaj en paco.

O.Sher  
Sekretario  
Bronkhorststraat 75, Groenkloof 0181

.....

(+ p 4)

Al tiuj, kiuj tiel multe helpis min dum mia regado kiel Redaktoro, mi esprimas miajn elkorajn dankojn. Mi ĉiam alte taksis viajn kontribuojn, sugestojn kaj sindonan helpon.

Al la nova Redaktoro - sukceson! La tasko ŝajnis grandega, eĉ timiga, komence sed mi lernis multon ne nur pri redaktado, sed ankaŭ pri kaj per Esperanto mem, kiel ankaŭ pri la movado. Mi esperas, ke iom simile estos al mia sekvanto.

Laste, al la legantoj en Sudafriko kaj en la eksterlando - pluvivigu nian revuon per viaj kontribuoj kaj daŭra subteno kaj interesiĝo.

Salutojn kaj prosperan novan jaron al vi ĉiuj. Same feliĉan Kristnaskon.

Cobus Zeelie

#### TEZOJ PRI ESPERANTO TRA LA MONDO

Ĝisdate la jenaj tezoj pri la uzo, sukceso k.a. rilate al Esperanto aperis en diversaj landoj:


<u>LANDO</u>	<u>Numero</u>
Aŭstrio	1
Belgio	6
Brazilio	1
Britio	1
Bulgario	1
Ceĥoslovakio	3
Francio	4
FR Germanio	2
DR Germanio	1
Hungario	5
Irlando	1


Italio	3
Kubo	1
Malto	1
Meksiko	1
Nederlando	3
Pollando	12
Ruslando	10
Sudafriko	1
Svedio	1
Usono	3

Sumo laŭ diversaj niveloj (64):

Doktora	17
Magistra	31
Diploma	2
Instrutezoj	5
Aliaj niveloj	7
Nur aludoj al E.	2

#### GRAFIKA REPREZENTO PRI LA OFICIALA INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA MONDO





### PENSETOJ EL L'VIVO

: Ne ridu pro la nescio de amiko. Li eble scias ion, kion vi ne scias.

: Parolpovo estas bona talenco. Silentpovo eĉ pli bona.

: Se vi serĉas edzinon, fermu la okulojn kaj malfermu la orelojn. Vi baldaŭ trovos la taŭgan edzinon - neniu argumentado devas esti tia, ke feliĉa geedziĝo ĝin ne malvarmigis....

: Elparolu viajn proprajn vortojn kaj ne tiujn de aliu-  
lo, se vi ne deziras fordoni la identecon kaj proprajn pensojn.


: Rideto estas kurvo, kiu rektigas preskaŭ ĉion.

: Alkoholo - trinkaĵo, kiu kaŭzas, ke oni vidu duoble, sed sentu sin ununura.

: La kulpoj de virino estas multaj, sed tiuj de viro nur du - ĉio, kion li diras kaj ĉio, kion li faras!

: Virinoj estas tre lojalaj. Ili vivas ĝis aĝo, kiun ili ŝatas.....kaj ĉiame restas tie.

: Iam oni devas malpravi kaj erari antaŭ ol sukcesi. Eble eĉ antaŭ ol sciigi pri kio sukceso vere estas....



### ESPERANTO APUD "VAALBULT"

Antaŭnelonge mi vidis skatolojn surskribitajn ESPERANTO. En la skatoloj estis fruktoj, kiuj devenas de la bienaro kiu liveras al Ceres Fruit Packers posedata de Associated Interests. Associated Interests apartenas al la familio

Bell sed la familio ne scias de kie kaj kiumaniere esti-  
ĝis la varmarko ESPERANTO, escepte de tio, ke la plej  
granda bieno en la grupo ankaŭ nomiĝas ESPERANTO. La  
antaŭa farmisto Carl Petrus Malherbe jam mortis. Lia  
edzino, kiu nuntempe loĝas en Villiersdorp informas, ke  
ŝia edzo donis al la bieno tiun nomon. Tamen, li ne estis  
aktiva Esperantisto. Ties kuzo, Gerard Malherbe ankoraŭ  
bienas apud ESPERANTO sur VAALBULT. Kaj Ceres kaj Villiers  
Villiersdorp situas en sudokcidenta Kabprovinco.

### FAVORMORTIGO

Tute akceptebla al multaj homoj, sed tre pika afero al  
egale multaj. Kion vi opinias?

Argumentoj pro: Devigan favormortigon oni rekomendis jam  
en la antikva mondo. Maljunuloj estis forlasitaj en pri-  
mitivaj societoj. La forigon de neperfektaj geknaboj oni  
praktikis en Grekio kaj Romo (Pluto kaj Aristotelo).  
Oni proponis en 1936 nedevidan laŭvolan favormortigon en  
la jenaj kazoj: La ŝtato devas ĝin rajtigi. La paciento  
devas havi almenaŭ 21 jarojn. La paciento suferu pro  
morta, nekuracebla difekto akompanata de severa doloro.  
Formala petilo devas esti subskribita de la paciento en  
la ĉeesto de du atestantoj. La subskribita petilo plus  
du atestoj (unu de la hejmkuracisto kaj unu de alia ku-  
racisto) devas esti metataj antaŭ speciala arbitracianto.  
La arbitracianto devas konduki personan intervjuon kun  
la paciento, por ke ĉi tiu povu scii kio eventuale koz  
okazu. La mortigon devas fari la rajtigito en la ĉeesto  
de oficiala atestanto, t.e. Pastro aŭ Pacjuĝisto.  
Rekomendantoj de favormortigo alprenas la vidpunkton ke:  
La doloro estas la absoluta malbono. Mortiĝo de digneco  
kaj ripozo estas pli dezirata ol la 'elkrioj, ĝemado  
kaj malbenado'. La doloro kaj la suferado estas transpor-  
tataj al la familianoj. Individuo rajtas morti se li  
tion deziras.

Argumentoj kontraŭ: Deviga favormortigo povas fariĝi  
preteksto forigi neŝatatojn kiel personajn malamikojn.  
La tuta afero estas senemocia kaj pezaĉa.





Estimataj gelegantoj,

la amoplana polus-ursa paro sur la frontpaĝo memorigu vin ne pri tio, ke en la suda hemisfero finiĝas vintro kaj en la norda alproksimiĝas la malvarma sezono.

Kial do mi elektis ĉi tiun belan, pacoplenan bildon? Ĉu la du bestoj ne aspektas kvazaŭ ili povus damaĝi al neniŭ? Kaj tamen ili ĉasas kaj voras aliajn bestojn, por vivteni sin. La harmonio inter tiuj du blankaj bestoj do trompas...

Sed ĉu la homoj estas pli bonaj? Ne nur, ke ili ankaŭ mortigas bestojn por vivteni sin - ĉu ili ne voras ankaŭ aliajn homojn? Eĉ se ili ne mortigas aliajn, kiel okazas en multaj militoj daŭre dise en la mondo, ili minimume ekspluatas aliajn, subigante ilin por la propra profito.

Sed la historio instruas, ke la ekspluatatoj ne por ĉiam eltenas kaj toleras tion. Iun tagon ili ribelas ne nur individue, sed amase, kolektive. Tian interhoman tragedion ni momente observas denove, nun en Sud-Afriko. Jes, nur observas, ĉar - kiel diras multaj en aliaj partoj de l' mondo - kion ni ja povus fari? La politikistoj diskutadas pri rimedoj, kiel devigi la sud-afrikan registaron, doni al nigruloj kaj aliaj ne-blankaj homoj verajn homajn rajtojn. Sed dum ili diskutadas, mortas ĉiutage nigruloj - kaj nun la morto atingis ankaŭ jam la blankulajn regionojn.

Estas malfacile por alilandanoj, kompreni la sintenon de l' blankuloj kaj ties registaro en Sud-Afriko. Kaj niaj esperantistaj geamikoj en Sud-Afriko silentas. Kion ili opinias, kion pravigas kaj kion ne? Ĉu ankaŭ ili asertas, ke vera demokratio estas afero nur por blankuloj? Aŭ ĉu ili opinias kun usona prezidanto Reagan, ke la nigruloj en Sud-Afriko ja havas jam grandan liberecon, eĉ rajtas frekventi samajn restoraciojn kiel blankuloj?

Kaj kion diras aliaj afrikanoj? Kion diras eŭropanoj, kiuj multe profitas pro filioj de okcidentaj firmaoj en Sud-Afriko?

Sincere via

Stefan Maul

Stefan  
Maul



MONATO 9/85

FIERA BILANCO

Unu el la plej bonaj propagandiloj estas la nomo ESPERANTO aŭ ZAMENHOF en publikejo. Ĉu vi jam kontaktis iun en via urbo pri tia strato, konstruaĵo, ponto, placo kaj tiel plu? Nepre penu - vi povas nenion perdi!

HEROLDO DE ESPERANTO aperigis plenan liston pri objektoj, kiuj portas unu el la ĉi-supraj nomoj. Kaj la listo estas tre impona! Pli ol 530 objektoj en 32 landoj en 5 kontinentoj, verdire.

Avenuoj/bulvaroj/fontoj/ĝardenoj/monumentoj/montodomoj/muzeoj/parkoj/placoj/ŝipoj/tabuloj:

Argentino: 6	Japanio: 2
Aŭstralio: 2	Jugoslavio: 2
Aŭstrio: 14	Kanado: 2
Belgio: 9	Libano: 1
Brazilo: 54	Madagaskaro: 1
Britio: 4	Nederlando: 28
Bulgario: 42	Norvegio: 3
Ĉeĥoslovakio: 15	Nov-Zelando: 1
Finnlando: 2	Pollando: 56
Francio: 86	Portugaliao: 1
FR Germanio: 45	Sovetunio: 6
Germana Demo. Respubliko: 1	Sud-Afriko: 5 (6)
Hispanio: 53	Svedio: 3
Hungario: 27	Svislando: 3
Israelo: 12	Urugvajo: 1
Italio: 47	Usono: 1

En nia propra lando estas konstruaĵoj en Kempton Park kaj Pieter Maritzburg, kiuj portas la nomon ESPERANTO. En Ceres estas grava fruktobieno kun la nomo ESPERANTO kaj kies varmarko ankaŭ estas ESPERANTO. La urboficisto de Port Elizabeth jam akceptis la proponon nomi straton laŭ ESPERANTO aŭ ZAMENHOF. Eble iu pripensu nomi straton en la naskiĝurbo de nia propra bone konata poeto Edwin de Kock laŭ li? Ek al la laboro sudafrikaj samideanoj! Faru ion por la jubilea 1987!!! (Vidu p 22)

## Vagonvojaĝo

Sunosplitoj silkaj, sulkoj por floraro,  
Glitas; la lokomotiv-savonto vibras;  
Birdoj, nuboj kaj ondetoj anticipas;  
Jen iluminado! Fine la signalo!

Ni eskapas de l' urbego malamika;  
Heziteme sub barantaj muroj; rampe  
Tra minacaj fabrikejoj; ekkurante  
Preter patrolstratoj ĝis la bonveniga  
Verdo viva tuj malligas, ĝoje flamas.  
Elsternante sanktan spacon, dolĉan dison,  
Efiĝante ene praan paradizon,  
La liberigita trajno nun elanas.

Forgesinte la unuajn penajn kolorojn,  
Anapeste skandas mejlojn la vagonoj,  
Paŭzas nur por la cenzuraj stacidomoj,  
El ĉielo, kampoj ĉerpas metaforojn.

Kaj for, faldo super faldo, flustre flutas  
Montoj: "Venu kaj vin vindu valoj mildaj".  
Klariĝante, keltkoloraj, tartankiltaj  
Krestoj pli kaj pli akcele ĝigojn ludas.


Jam apudaj, per trumpetoj imponegaj  
Puŝas pintoj proponentaj povon alte:  
"Kien nebulnimbaj kronas paŝu arde  
Ĝis rivelos ventoj al distancoj vekaj".

Kaj mi veturadis sur la ebenajo  
Maren, dum montaroj transen min invitis.  
Krom vasteco, ĉirkaŭpremon mi avidis.  
Ĉu mi trovos amatinon post vojaĝo?

Al revulo kaj vagado mankis limo.  
Sed gaelaj lipoj gajaj ne min logos  
Al amado, kaj Okcitanujo vokos  
Softe, ke mi ekpilgrimu al Ivino.

Ho, floreto franca, ĉiam freŝa, kion  
Revis vi dum tago tiel promesplena?  
Ĉu la koro estis same tremetema?  
Ĉar mi estis vin amonta baldaŭ, tiom.

Timothy Carr



Petro: Mia amiko vetis sian lastan R10 je ĉevaloj la tagon antaŭ hieraŭ. Nur hazarde li rezulte de tio gajnis kelkajn milojn da Randoj.

Johano: Kaj kion li faris???

Petro: Nu, ĉar lia edzino batus lin, se ŝi eltrovus, ke li vetis monon je ĉevaloj, li ne povis informi ŝin. Do, li decidis meti la monon sub la laktoskatolo ekster la frontpordo de la domo. Li bone sciis, ke edzinjo trovos la monon tie kaj opinios, ke ĝi estas de helpanta mano.

Johano: Kaj ĉu ŝi opiniis tion?

Petro: Ne tute. Ŝi ja opiniis la laktoportiston freneza kiam ŝi trovos botelojn da lakto de la tero ĝis la plafono!

"Paĉjo! Paĉjo! Mi mortigis kvar musojn! Du virojn kaj du inojn."

"Sed kiel vi scias, ke du virojn kaj du inojn?"

"Ho, tutfacile! Du sidis sur la spegulo kaj la liaj du sur la vinbotelo!"

Kiam knabinoj estas junaj, ili ludas kun pupoj.  
Kiam knaboj estas junaj, ili ludas kun soldatoj.  
Kiam knabinoj estas maljunaj, ili ludas kun soldatoj.  
Kiam knaboj estas maljunaj, ili ludas kun 'pupoj'.

Kio sidas en unu angulo, sed traveturas la tutan mondon?  
Poŝtmarko!

Kiel oni faras fiŝreton? Kunigu multajn truetojn per ŝnuretoj.....

Ĉe la publika naĝejo: Fraŭnjo, dupartaj naĝkompletoj ne estas permesataj ĉi tie.

Respondo: Ĉu vi deziras, ke mi forigu unu parton?

### NOVA KATEGORIO DE UEA MEMBRECO

Tra la jardekoj, pro diversaj transpagaj kaj pagaj problemoj, la individua membreco en UEA iom post iom fariĝis privilegio de Esperantistoj en la ekonomie bonstataj landoj. La Komitato de UEA faris decidon, kiu atendeble povus montriĝi historia paŝo rilate la geografian distribuitecon de la individua membraro de UEA. Temas pri la decido enkonduki ekde 1986, eksperimente por la venontaj tri jaroj, tute novan kategorion de la individua membreco - Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado. Kion ricevos la membroj de la nova kategorio? Krom la membro karton, kiu rajtigas utiligon de la diversaj servoj de UEA, la novaj membroj ricevos 100-paĝan depresaĵon de la Jarlibro, kiu enhavas amason da adresoj kaj aliaj utilaj informoj ne nur pri UEA sed ankaŭ pri la landaj kaj fakaj asocioj kaj diversaj aliaj movadaj instancoj. Fakte, tiu jarlibra depresaĵo (Gvidlibro tra la Esperanto-movado) estos tiu parto de la tradicia Jarlibro, kiu ne enhavas la adresaron de la Delegita Reto de UEA.

### PRI KIUJ NI CELIGAS NIAJ PENOJ DISVASTIGI ESPERANTON ?

De tempo al tempo oni legas artikolojn pri kiel efike disvastigi la internacian lingvon. Ja estas fakto, ke la plejmulto da Esperantistoj estas pliaĝuloj, ne nur en kelkaj landoj sed sen ia dubo en preskaŭ ĉiu lando sur la terglobo. Ke la estonteco, la forto kaj sorto de nia kara lingvo kuŝas en la manoj de la junularo estas nur tro bone konate por komento. Do la demando estiĝas: kiel interesi kaj aktivigi la gejunulojn pri Esperanto?

Eble TEJO bone rolas ĉi-rilate, sed sendube estas, ke ne vere necesas aŭ entuziasmigi aŭ aktivigi ilin. Kio vere gravas estas tio, ke oni kiom eble klopodu oficialigi la Interlingvon kiel studobjekton en la edukaj institutoj, kie ĝi laŭnature apartenas! El tio ja devos sekvi sukceso, kiel ankaŭ sufiĉa multo el aliaj direktoj, kiujn ni deziras por la lingvo.....

Tamen, la problemo de oficialigo estas samgranda kiel ĝia disvastiĝo nome, kiumaniere interesi la edukajn ĉefojn.

La atakplano certe ne estas tiel malfacila, kiel oni inklinas opinii! La baza ideo estas, simila al ĉio alia en nia vivo: komenci ĉe la komenco!! Tio estas, kaj eduki pri, kaj instrui Esperanton al tiuj, kiuj gravas - nome, la edukistoj mem. Ni informu ilin pri la valoro, avantaĝoj k.t.p. de la lingvo, ne nur por ili mem, sed eĉ plie, por iliaj lernejoj kaj studentoj. Tiuj, kiuj lernas la lingvon povas poste instrui ĝin al siaj propraj lernejoj kaj studentoj, eĉ neoficiale, se necese. La lingvo sin pruvinte preskaŭ per si mem oficialiĝos post bona sukceso. En kelkaj landoj eble necesus, ke oni bone instruu (eduku?) la gepatrojn de lernejoj pri la edukvaloro de la lingvo, precipe en institutoj kie oni proponas aŭ proponos ĝin kiel eblan studobjekton. Per bone planita prelego estus relative facile konvinki, ĉar kiuj gepatroj ne altetaksus sukceson pri iu studobjekto, kiam ĉi tiu tuŝas la progreson de iliaj infanoj? Fine, se sukcesos la gejunuloj pri Esperanto, kiu alia pruvo necesos persvadi ankaŭ la plenkreskulojn lerni la interlingvon?

Eĉ se oni sukcesos persvadi nur unu edukinstituton en sia lando proponi Esperanton, la pilko baldaŭ pli rapide komencos ruliĝi. Tion jam pruvis la evoluado de Esperanto en edukaj institutoj dum la periodo 1953 ĝis 1984. En 1953 nur 20 institutoj en 8 landoj proponis Esperanton. En 1970, 17 jarojn poste, 30 institutoj en 15 landoj instruis la lingvon. La kreskado pri institutoj kaj landoj estis 50% kaj 88% respektive. Por la periodo 1971 ĝis 1984, nur 13 jarojn poste, la kreskado estis 263% kaj 47%. (Vidu paĝon 7) El ĉi tiu informo oni konstatas, ke la landnombra progreso (88%) unue estis bona kompare tiun de la instituta (50%), kaj due, ke dum la sekvantaj 13 jaroj la instituta progreso (263%) superis la landan (88%). La kialo por tio estas verŝajne, ke persvadi novaliĝintan landon proponi Esperanton en siaj edukaj institutoj ne estas tiel facile, sed post kiam tiu lando permesis ĝin eĉ nur en unu instituto, baldaŭ la akirita sukceso mem permesas al la interlingvo

eniri ankaŭ en aliajn samlandajn institutojn.

Kvankam ne estas facile doni precizajn nombrojn, sufiĉas scii, ke Esperanto nun estas (ne)oficiala kurso en ĉirkaŭ 36 landoj trans la mondo. En pli ol 110 landoj troviĝas delegitoj de la monda asocio, UEA. Preskaŭ 100 periodaĵoj regule aperas. Tio, kion la Movado nun urĝe bezonas, estas utiligi tiojn kaj tiujn al si disponeblajn.

En Sudafriko la solan oficialan kurson oni proponas ĉe la Portelizabeta Teknikono, sed kurso funkcias ankaŭ ĉe Johanesburga instituto por dotitaj infanoj.

Planoj por kurso ĉe la Kaburba Teknika Kolegio kaj ĉe la Universitato de Kaburbo bone progresas. Grupo ekzistas ĉe Pretoria Universitato.

#### NOVAJ IDEOJ PRI LA MALAPERO DE LA DINOSAŬROJ

Defio al la malnova teorio pri la forpaso de la dinosaŭroj estiĝis kiam sciencistoj antaŭ nelonge sugestis, ke grandega aerolito estigis antaŭ 65 000 000 da jaroj transgloban fajrostormon, kiu, per la rezulta fulgo kaŝblokis la sunlumon dum multaj monatoj.

Cindroj pro brulintaj vegetaĵoj verŝajne ĉesigis fotosintezon kaj mortigis miriadojn da plantoj, do sekve ankaŭ la dinosaŭrojn, kiuj nutris sin per ili. Krome, la cindronubo malvarmegigis la teron kaj la brulantaj fajroj plue kaŭzis mortigajn kvantojn da karbona monoksido ( $CO_2$ ) en la atmosfero. Pruvo por ĉi tiu teorio troviĝis en 65 000 000 jaraj argiloj en Danlando, Nov-Zelando kaj Hispanio.

Plue, oni kredas, ke se la aerolito - eble 8 km larĝa - trafis la oceanon, la radiigado kaj varmegaj gasoj kaŭzintaj de tia frapo kapablis tute forbruli vegetaĵojn sur kontinentoj distancaj centojn da kilometroj. La fajro probable

disvastiĝis trans la tuta kontinento kaj la rezultaj ventoj disigis la fulgon transmonden. Se la frapo okazis en la Bering Maro (laŭ favoraj opinioj), kaj Eurasio kaj Nord-Ameriko estus ĉe distanco de ekbruliĝado.


#### EL LA SCIENCO: NFOj - Nova Opinio

Pli kaj pli da sciencistoj jam forte kredas, ke la rapideco de lumo ne estas la rapideclimo, kaj se tio ja estas vera, la ekzisto de la tiel nomitaj 'flugantantaj subtasoj' aŭ Neidentigitaj Flugantaj Objektoj (NFOj) eble ne estas tute tiel fantazia!

Kvankam Einstein kredis, ke nenio povas veturi pli rapide ol lumo (ĉ. 310 000 Km ĉiusekunde) ĉar je tiu rapideco la tempo haltas. Oni ne forgesu, ke la

homa kono pri la fiziko estas limigita je surteraj kondiĉoj kaj ties tujaj cirkaŭaĵoj en la spaco. Do, kiu ajn argumentoj pri la tempo, la spaco, la materio kaj la vivo validas nur sub tiuj kondiĉoj.

Oni nuntempe kredas, ke la lumrapidecon



estas eble preterpasi, kaj je super tiu rapideco la materio eniras fremdan universon aŭ dimension. Samtempe ekzistas la ideo, ke je lumrapideco - sen pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo de la movadrapideco - la veturanta objekto fariĝas zaŭ fiksita en la spaco kaj tial ne povas forlasi tiun universon.

Koncerne ĉi tiun teorion, estas interese, ke se estas eble veturi je rapideco pli granda ol tiu de lumo, ĉu tio ne ebligas al la homo ankaŭ preterpasi la tempon? Tio estas, veturi en la pasintecon aŭ en la estontecon? Ĉu alloga aŭ danĝera, la ideo certe estas pensiga!

Ĝisnune unu el la plej gravaj kialoj por la fakto, ke homoj ne kredas, ke NFOj vizitadas la Teron de el la spaco estas la grandegaj distancoj kaj tial ĉi la veturtempoj koncernaj.

Tamen, neniun mensosana persono rajtas kredi, ke inter la nekalkuleblaj planedoj en la universo ne ekzistas almenaŭ kelkaj sur kiuj troviĝas inteligenta vivo. Inter tiuj, aldone, devas esti pli inteligentaj kaj pli evoluiĝintaj ol ni, sur la Tero. Laŭ la leĝoj pri probablecoj, astronomoj kalkulis, ke nur en nia propra galaksio devas esti ne malpli ol 1 000 000 da planedoj kapablaj subteni vivon kiel ni konas tion sur nia propra planedo.

Konsideru, ke en la universo troviĝas milionoj da galaksioj similaj al nia 'laktovojo'. En ĉiu galaksio estas nekalkulebla nombro da sunsistemoj el kiuj multegaj estas pli grandaj ol nia laktovojo kaj enhavas multe pli da sunoj. Multaj el tiuj sunoj havas pli multajn planedojn ol havas nia suno, Sol. Kiu do prave povas sugesti, ke vivo sur aliaj planedoj ne estas ebla? Ke tiuj vivoformoj ne similas la homajn aŭ ke ili ne povas esti pli inteligentaj ol ni kaj tial sukcesis superi la problemojn pri veturrapideco konataj al ni pro nia limigita teknologia scio?

Ekster la rapideco de lumo, la ebleco ja ekzistas, ke oni povas veturi longajn distancojn sen ke la tempo forpasas. Eĉ se ni povus veturi lumrapide, tio ankoraŭ signifus, ke por traveturi nian propran galaksion ( $10^{18}$  Km)

oni bezonus 100 000 jarojn. Fakte, por veturi de nia tero ĝis la bordo de nia galaksio ( $2 \times 10^{17}$ ) oni bezonus 20 000 jarojn. Ĉi tiuj nombroj estas almenaŭ stultigaj kaj fariĝas eĉ pli tiaj, se oni parolas pri vojaĝoj al aliaj galaksioj. Tamen, se oni povas traveturi iun ajn distancon dum la tempo haltas, kiu rajtas diri, ke vizitoj fare de estaĵoj de aliaj planedoj ne realiĝos?

### HANUKAH

Dimanĉon la 1985/12/08-an, aŭ eble pli ĝuste jam la antaŭan vesperon, komenciĝas la Juda Festo de *Hanukah*, kaj kiu daŭras 8 tagojn. Ĝi memorigas pri la venko en la jaro 165 a.K. de *Jehuda ha Makabi* kontraŭ la grekoj kaj la resanktigo de la Templo. Dum la resanktigo oni trovis nur unu ujon da oleo kun la sigelo ankoraŭ ne rompita. La oleo estis sufiĉa por unu tago, sed ĝi briliĝis 8 tagojn, la tempo necesa por prepari novan. Tial la festo daŭras 8 tagojn.

La unuan tagon oni ekbruligas unu kandelon; la duan, du.... ĝis la okan, ok. Estas kroma kandelo ĉiun vesperon, kies hebrea nomo signifas Pedelo, kaj per kiu oni ekbruligas la aliajn. Oni rajtas nur rigardi la kandelojn, ne uzi la lumon por iu ajn laboro. Se tio ja okazas, onidire estis la lumo de la Padelo.

Frandaĵo de *Hanukah* estas terpomaj krespoj. Infanoj ludas per kvarflankaj turboj. Sur ĉiu flanko estas komenclitero de unu el la 4 hebreaj vortoj, kies signifo estas "granda miraklo okazis tie". Ili klopodas diveni, kiel kuŝas la turbo kiam ĝi ĉesos turni. Oni donacas al infanoj monon, kutime kiam oni ekbruligas la kvinan kandelon.

O Sher

## ESPERANTO-OBJEKTOJ EN SUDAFRIKO

- :Pretorio: Nomo - Esperanto**  
 Konstruis - s-ro Semmelink, Esperantisto  
 Baptis - la sama persono  
 Jaro - 1965  
 Konsistas el - 48 apartamentoj  
 3 butikoj  
 Situas - Skinnerstrato, Centralo
- :Pretorio: Nomo - Esperanto**  
 Konstruis/baptis/jaro/konsistas el - ?  
 Situas - Kerkstrato, Arcadia  
 (pli da informo poste)
- :Kempton Park: Nomo - Esperanto Shopping Complex**  
 Konstruis - LTA  
 Baptis - ?  
 Jaro - 1970  
 Konsistas el - 28 butikoj  
 apartamentoj planataj  
 Situas - en Pretoriovojo  
 (tre granda/apud Jan Smuts Aervaheno/por  
 la tuta Vaal Triangulo)
- :Pietermaritzburg: Nomo - Esperanto**  
 Konstruis - s-ro S de Waal  
 Baptis - la sama persono  
 Jaro - 1949  
 Konsistas el - 16 apartamentoj  
 Situas - Boomstraat, Centralo
- :Ceres: Nomo - Esperanto**  
 Baptis - s-ro C P Malherbe  
 Apartenas al - Familio Bell  
 Kio - Bienaro el kiu la plej granda farmbieno  
 estas "Esperanto". La aro liveras fruktojn  
 al Ceres Fruit Packers posedata de  
 Associated Interests (kiu apartenas al  
 la Bell familio. Oni uzas la varmarkon  
 "Esperanto"-n.

TESTO:

## Ĉu vi estas kolektanto aŭ papilio?

Anna Brennan kaj Renato Corsetti, Italio ■

Prepore al la 100-jara Jubileo de Esperanto, Unuiĝintaj Nacioj, antaŭ ol rekomendi la oficialan enkondukon de Esperanto en la lernejojn de ĉiuj ŝtatoj-membroj, sekrete faris lastan studon por certigi, ĉu esperantistoj estas fanatikaj trenezuloj aŭ nur sendanĝeraj naivuloj. Tiu studo, kiu estis zorge ellaborita de teamo de internacie konataj psikologoj, kondukis al tabelo, kiun ni prezentas al vi ĉi tie.

Komencu  
ĉi tie

Ĉu vi preferas homojn aŭ objektojn? <b>Homojn ▶</b> <b>Objektojn ▼</b>	Ĉu vi iam serioze kalkulis la valoron de la sumo en steloj? <b>Jes ▶</b> <b>Ne ▼</b>	Ĉu vi emociiĝas dum kantado de la himno? <b>Jes ▶</b> <b>Ne ▼</b>	Ĉu vi iam havis dubojn pri la valoro de viaj verkoj? <b>Ne ▶</b> <b>Jes ▼</b>	Verdstelulo			
Ĉu vi vindas viajn jarkolektojn? <b>Ne ▶</b> <b>Jes ▼</b>	Ĉu vi informus viajn korespondantojn pri la naskiĝo de via nevino? <b>Ne ▶</b> <b>Jes ▼</b>	Ĉu Tonkin aŭ Waringhien? <b>Tonkin ▶</b> <b>Waringhien ▼</b>	Ĉu vi konas la diferencon inter statuto kaj regularo? <b>Jes ▶</b> <b>Ne ▼</b>	Statutulo			
Ĉu perfekteco aŭ rapideco? <b>Rapideco ▶</b> <b>Perfekteco ▼</b>	Ĉu vi preferus ricevi bildkarton aŭ cirkuleron? <b>Cirkuleron ▶</b> <b>Bildkarton ▼</b>	Ĉu LPLP aŭ Heroldo? <b>Heroldo ▶</b> <b>LPLP ▼</b>	Ĉu vi iam finlegis la jarraporton de via landa asocio? <b>Jes ▶</b> <b>Ne ▼</b>	Ĉu aktiva aŭ pasiva? <b>Aktiva ▶</b> <b>Pasiva ▼</b>	Ĉu vi iam ajn parolis antaŭ 200 homoj? <b>Jes ▶</b> <b>Ne ▼</b>	Organizanto	
Ĉu vi katalogas viajn librojn? <b>Ne ▶</b> <b>Jes ▼</b>	Ĉu Folkloro Vespere aŭ Kongresa Universitato? <b>Kongr. Univ. ▶</b> <b>Folk. Vesp. ▼</b>	Ĉu vi emociiĝas dum diskuto pri landonomoj? <b>Ne ▶</b> <b>Jes ▼</b>	Ĉu vi pli bone laboras unuope aŭ en grupo? <b>Grupe ▶</b> <b>Unuope ▼</b>	Ĉu Fonto aŭ IFEF-bulteno? <b>IFEF-bulteno ▶</b> <b>Fonto ▼</b>	Ĉu IJK aŭ vojaĝo al Parizo? <b>IJK ▶</b> <b>Parizo ▼</b>	Fidela membro	
Kolektanto		Plumamiko	Ĉu vi konas la nomon de la prezidanto de la Akademio? <b>Ne ▶</b> <b>Jes ▼</b>	Ĉu Claude Piron aŭ bela blondul(in)o en la trinkejo? <b>Blondul(in)o ▶</b> <b>Piron ▼</b>	Ĉu nova libro aŭ nova amiko? <b>Amiko ▶</b> <b>Libro ▼</b>	Ĉu vi renkontis vian lastan amik(in)on en Esperanto-aranĝo? <b>Jes ▶</b> <b>Ne ▼</b>	Papilio
		Ĉu kurso aŭ ekskurso? <b>Ekskurso ▶</b> <b>Kurso ▼</b>	Ĉu vi sekrete esperas eldoni viajn taglibrojn? <b>Ne ▶</b> <b>Jes ▼</b>	Ĉu bona lego aŭ bela lago? <b>Lago ▶</b> <b>Lego ▼</b>	Ĉu vi kutimas paropreni postkongresojn? <b>Jes ▶</b> <b>Ne ▼</b>	Turisto	
		Esperanto- logo	Verkisto	Leganto	Abonanto		

### Al kiu kategorio vi apartenas?

**Kolektanto:** Via hejmo ne havas sufiĉe da ŝrankoj kaj bretoj por teni ĉiujn librojn, revuojn, insignojn, flagetojn, glumarkojn kaj alumetoskatolojn, kiujn vi hamstris tra la jaroj. Se iu hazarde posedas la trian numeron de la jarkolekto de *Sud-Moravia laboristo*, vi volonte kontaktus tiun homon.

**Plumamiko:** Neniu kies adreso aperis en la kongresa libro estas sekura kontraŭ vi. Vi jam fiere reklamas pri viaj 200 korespondantoj – ne gravas, ke nur la kvarono efektive respondas viajn leterojn.

**Esperantologo:** Vi opinias, ke en *Plena analiza gramatiko* estas erara prezento de la adjektivoj, kiujn vi preferas nomus "adjektaj esprimoj". Vi ankaŭ elpensis novan teorion pri la uzo de la akuzativo post "kiel", kaj vi intencas verki eseon pri via teorio.

**Verkisto:** Ne eblas malfermi revuon – ĉu *Argentina stelo*, ĉu *Transoceanio*, sen trovi artikolon de vi. Se la mondo ne rekonas ian talenton, vi preferas mem pagi la eldonkoston ol senigi la publikon de via mesaĝo. Intertempe vi sendas kvar poemojn al Belartaj Konkursoj.

**Leganto:** Vi abonas revuojn kaj legas ilin, aĉetas librojn kaj legas ilin, foje iras al via loka klubo, ĉiun duan jaron al la nacia kongreso, eble eĉ de tempo al tempo al la Universala Kongreso. Viaj kolegoj apenaŭ scias, ke vi estas esperantisto, kaj vi ne provas konvinki viajn kunvojaĝantojn en la trajno.

**Abonanto:** Via onklo pagis la kotizon por vi, kaj do vi aliĝis. Eble vi ankaŭ legus la revuojn, se ili ne estus en Esperanto. Vi vizitas la kurson de tempo al tempo, sed neniam faras la hejmtaskojn. Vi ŝatas esperantistojn, kaj certe linstudos la lingvon – iam.

**Verdstelulo:** La homoj kaŝas sin kiam ili vidas vin alproksimiĝi kun viaj verdaj steloj kaj flugfolioj. Vi tamen ĉasas ilin por konvinki ilin unue pri Esperanto, due pri Homaranismo, trie pri nova religio, kvare pri nova monsisistemo, kvine pri la bezono je normigitaj ŝraŭboj en Azio.

**Statutulo:** Dum aliaj kongresanoj ĉeestas ekskursojn, vi fondas novan komisionon por mem aliĝi al ĝi. Vi konas parkere la statuton de UEA, kaj jam laboras super kvin amendoj al ĝi.

**Organizanto:** Vi ne ofte sukcesas iri al Universalaj Kongresoj, sed vi neniam maltrafas vian landan renkontiĝon. Post la malsukceso de la lasta membrokampanjo, vi estas la sola aganta membro de komisiono por altigi la membronombrojn je 25% ĝis la Jubilea Jaro.

**Fidela membro:** Viaj lumbildoj ne estas la plej interesaj, kaj viaj klarigoj estas la pruvo pri la malfacileco de Esperanto. Neniu Zamenhof-vespero estus kompleta sen vi. Brilaj homoj venas kaj malaperas, sed vi pluaranĝas viajn ekspoziciojn en la loka biblioteko. Vi estas la bazo de ĉio.

**Papillo:** Vi flue parolas Esperanton, sed neniam ellernis la gramatikon. Vi ĉeestis ĉiujn kunvenojn, precipe la internaciajn. (Kion cetere vi farus alikaze dum la novjara vespero?) Via plej ŝatata programero estas la balo.

**Turisto:** Laŭ vi neniu vojaĝagentejo povas konkurenci kun organizantoj de karavanoj al kongresoj. Post la Solena Inaŭguro, vi tuj kuras por aĉeti biletojn al ĉiuj ekskursoj. Vi trovas la Jarlibron ege utila por serĉi gastigantojn. ■

INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI  
 INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI  
 INTER NI **INTER NI** INTER NI  
 INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI  
 INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI INTER NI

: En *DIE OOSTERDAG* (Port Elizabeth) aperis la 6-an de novembro artikolo pri Edwin de Kock kaj ties vizito al la Universitato de Portelizabetho por partopreni debaton pri Esperanto kiel solvon al la monda lingvoproblemo. Rezulte de la nova oficiala teknikona Esperantokurso, kiu komenciĝis la 4-an de septembro, multaj artikoloj kaj leteroj el la publiko aperis. Tiuj leteroj kaj artikoloj igis profesoron Willie Kruger de la lingva fako (Nguni kaj Sotho) inviti la lekciiston pri Esperanto ĉe la teknikono, s-ron Cobus Zeelie, kaj la prezidanton de SEA, s-ron Edwin de Kock, prelegi diversajn lingvospertulojn ĉe la universitato. La kunveno estis sukceso al la Esperanto-movado.

: La 22-an de novembro kunvenis la membroj de la Johannesburga Esperanto Societo en la domo de la nova prezidanto Julian Cloete. Oni aranĝos la kunvenon pro la vizito al Johannesburgo de Johannes Jooste, Esperantisto de Hartenbos (Kablando). Ĉeestos ankaŭ lia edzino kaj bofilo. Samtempe vizitos sian filinon en Johannesburgo Mike kaj Eileen Griffiths, delegitoj de Plymouth en Anglio. Pli ol dek du personoj ĉeestos. S-ro Henri Appel lekcios pri Zamenhof.

: En *VIVA EN OVERKRUIJEN* (1985-11-06) aperis artikolo pri Doktoro Jan Strydom de Waverley rilate specialan instrumanieron superi disleksion.

: Sub la titolo *NOT SO 'FRIENDLILY'* aperis en la letersekcio de *THE TOASTMASTER* de aŭgusto 1985 letero en kiu respondas Oscar Sher pri la anglalingva gramatiko kompare al la Esperanta. Li respondis al antaŭa letero kiun ensendis alia leganto plendante pri la uzo de la angla lingvo sur vojsignoj.

: La decido de la Portelizabetha Teknikono proponi Esperanton

kiel nedevigan studobjekton en la formo de mallonga kurso kaúzis ke 15 artikoloj, 4 oficialaj teknikonaj anoncoj kaj 11 leteroj (7 favoraj, 2 kontraúaj, 2 neútralaj) aperis en la ĵurnaloj, gazetoj kaj aliaj. La SABC/SAUK disaúdigis tralanden intervjuon pri la kurso inter radio-anoncisto kaj s-ro Cobus Zeelie. Artikoloj aperis en la jenaj: *Die Oosterlig*, *The Herald*, *The Evening Post*, *The Apple Express*, *The Algoa Sun*, *In Brevi* (PE Teknikona novaĵgazeto), *Die Beeld* (Johannesburgo), *Die Burger* (Kaburbo). Plua artikolo aperos en la PE Teknikona Jarlibro. Oni anoncis la antaúnelongan debaton pri la Interlingvo (kiu okazis ĉe la Universitato de Portelizabeto) en la UPE Novaĵletero. Hazarde, en la TV programo *Flinkdink*, oni jam dufoje metis al la partoprenantoj de tiu kvizprogramo demandojn pri la internacia lingvo Esperanto.

: Aranĝas en Kaburbo s-ro Felix Woolf Esperantokursojn ĉe la Kaburba Teknika Kolegio kaj la Universitato de Kaburbo. Oni planas la kursojn por la nova jaro. Sukceson al li!

: Pro la Esperantokurso ĉe la PE Teknikono ankaú la Portelizabeta Esperanto-Klubo (PEK) sukcesis komenci novan privatan kurson hejme de s-ino Adéle Fouché. Sukceson ankaú al ŝi pro ŝia senlacaj penoj pluvivigi Esperanton en Portelizabeto.

: SEA planas oficialan sudafrican poŝtmarkon okaze de la jubilea jaro 1986. En tiu jaro aperos, kondiĉe de sufiĉa kunlaboro far la sudafrica Esperantistaro, Memorlibro pri la Esperanto-movado en Sudafriko. La unuaj afrikansaj vortaro kaj lernolibro aperos samjare.

: En Portelizabeto s-ro Cobus Zeelie kunlaboras por nomi en la urbo straton laú Zamenhof aú Esperanto. Li antaúnelonge kontaktis *Wonderwonings Eiendomme Beperk*, kiu planas novan suburban kun butikoj, por ke oni nomu konstruaĵon laú Esperanto aú Zamenhof.

: Post kiam s-ro Cobus Zeelie kontaktis *The Royal Society of Arts* (Anglio) pri Esperanto-ekzamenoj, oni informis, ke

la societo tiujn ekzamenojn ne plu proponas. Post la sugesto skribi al la Brita Esperanto-Asocio, s-ro Zeelie kontaktis ĉi tiun kaj rezulte de la du leteroj oni prilaboras denove proponi la diversgradajn ekzamenojn. Ni akoraú atendas la finan decidon.ĉu aú ne *The Royal Society of Arts* kunlabore de la Brita Esperanto-Asocio refoje ekzamenos kandidatojn por Esperanto.

: Unuafoje - permese de la teknikonaj ĉefoj - PEK aranĝos sian jarfinan socian kunvenon en la kafejo de la PE Teknikono. Se ĉiuj Esperantistoj en la urbo ĉeestos, ni estos sume 26-30 samideanoj, se ne pli! Pasintecce PEK ĝuis tiun kunvenon aú hejme de iu Esperantisto aú en restoracio.

: Kiam la studentoj de la PE Teknikono decidis mendi Esperanto/English - English/Esperanto vortarojn de UEA (Teach Y. Serioj), ili eltrovis, ke pro la tre malfavora valoro de la Rando, tiu libro kostos al si po ĉ. R40!! Bonkore Axel von Blottnitz akaparis ĉiujn tiujn librojn en sia landparto. Tiumaniere la studentoj enigis 7 vortarojn. Tamen ili bezonas pliajn. Se vi povas helpi ĉi-rilate, bonvolu kontakti s-ron Cobus Zeelie ĉe: Lekciisto pri Esperanto, PE Teknikono, Privata Kesto X6011, PORTELIZABETO 6000. Estos tre bedaúrinde se la Esperanto-movado perdos studentojn pro tio, ke libroj ne haveblas al ili. Kion faras UEA pri la afero? Se Sudafriko estas lando en Afriko, ĉu ne la sudafricanoj same kiel la aliaj afrikanoj bezonas helpon.....?! Kion diras Hans Bakker pri la afero?

---

Kvar laboristoj ĉe brituja fabrikejo - anglo, irlandano, skoto kaj van der Merwe - decidis pikniki. Inter si ili aranĝis, ke ĉiu kumportu ion por la pikniko. Venis la tempo por la pikniko kaj - La anglo alportas pakajon da sandviĉoj. La irlandano alportas irlandmaniere frititajn terpomojn. La skoto alportas litron da skota viskio. Kaj van der Merwe alportas sian familion.....

---



LETERO AL LA REDAKTORO

Estimata

: ĈU SCIENCO, SENSENAĴO AŬ SENSACIO?

En *BONA ESPERO* numero 1985/22/3 mi legis -

"Nia sango travojaĝas 265 000 000 kilometrojn dum ĉiu tago"

Tio signifas, ke nia sango havas rapidecon de 3067,13 kilometroj en ĉiu sekundo. Tia hiper-supersona rapideco tra niaj arterioj, vejnoj kaj kapilaroj kaŭzas frikcion, kiu sendube vicigas nin inter la varmasangaj estaĵoj.

: ĈU PREMKURSO, PRESKOBOLDO AŬ NOVTTIPA KALENDARO?

En la sama numero (p. 3) oni legas pri Esperantokurso -

"...planata por la periodo Septembro 1985 ĝis junio 1986.....  
kiu daŭros 30 monatojn....."

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

Korajn salutojn. Dankon pro ĉio, kion vi faras por niaj periodaĵo, asocio kaj movado.

H W Appel

[Red. Kompreneble la tuta longeco de niaj sangotuboj en la korpo estas 265 000 000 metroj kaj ne kilometroj! ĈU SCIENCO, OPTIMISMO AŬ INFLACIO?!La kurso daŭros 30 semajnojn. ĈU PREMKURSO, MALBONA MATEMATIKO AŬ MANIERO SUPERI LA DEVALUTON EN NIA LANDO?!]

\* \* \*

Internacia Japana Lingvo?

Vokis la patrino: "Suzuki!"

(= nomo de filino)

Respondis la filino: "Ya ma ha?"

(= Jes, patrino?)

Ordonas la patrino: "Kawasaki Honda!"

(= Eldomigu Hundinjon)

\* \* \*

EL LA LIBRO DE JESAJA

La tuta kapo estas malsana, kaj la tuta koro estas senforta  
 Via arĝento fariĝis skorio, via vino miksiĝis kun akvo  
 Forrestis la gaja kantado pri via rikolto  
 Kaj via tero pleniĝis de idoloj,  
 vi adorkliniĝas al la faritaĵo de viaj manoj,  
 al tio, kion faris viaj fingroj.  
 Via vespero kunportas la truron:  
 antaŭ ol mateniĝi, vi jam ne ekzistos.

Ĉar delonge estas preparita la horora bruligejo  
 Ĉar venos la tago de konsterno kaj piedpremado kaj de konfuzo  
 kiu detruos la muron kaj sur la montoj krie estas aŭdata:  
 neniĝos la tero, kies du reĝojn vi timegas!  
 Kaj ĝiaj riveroj aliformiĝos en peĉon kaj ĝia polvo en sulfuron  
 kaj la tero fariĝos brulanta peĉo  
 Kaj la popoloj estos kiel bruligita kalko, kiel domoj dehakitaj,  
 ili forbrulos en fajro!  
 Kaj la fortulo fariĝos kiel stupo, kaj lia laboro kiel fajrero:  
 kaj ambaŭ brulos, kaj neniu estingos,  
 ĉar ili malobeis la instruon!  
 Jen la popoloj estas kiel guto el sitelo  
 kaj kalkulataj kiel polvo sur pesiltaso:  
 Restos el ili nek ia karbo, varmigonta,  
 nek ardaĵo, ĉirkaŭsidota  
 Kaj sekforiĝos la akvo el la maro,  
 kaj la rivero senakviĝos kaj sekiĝos,  
 la ĉielo disneniĝos kiel fumo,  
 la steloj de la ĉielo kaj ĝiaj stelfiguroj ne donod sian lumon,  
 la suno mallumiĝos leviĝante, kaj la luno sian lumon ne briligos  
 kaj la fundamento de la tero ekskuiĝos,  
 ŝanceliĝos la tero kiel ebriulo,  
 kaj balanciĝos kiel hamako,  
 kaj pezos sur ĝi ĝia krimeco, kaj ĝi falis,  
 kaj ne plu leviĝos?

La malvivuloj ne releviĝos, la ombroj ne reviviĝos

Konvertiĝos la restintoj.


Konvertiĝos la restintoj.  
 Oni ne malbonigos kaj ne difektos.  
 Elriposos, trankviliĝos la tuta tero.  
 Paco, paco al malproksimaj kaj proksimaj.  
 Kaj viaj gefiloj rekonstruos la antikvajn ruinojn  
 la fundamentojn de antaŭ multaj generacioj,  
 kaj ili ferĝos el siaj glavoj plugilojn,  
 kaj el siaj lancoj rikoltilojn,  
 kaj ne levos nacio glavon kontraŭ nacion,  
 kaj oni ne plu lernos militon.

Rozo David, Hungario



Sudafriko kaj ĝiaj enloĝantoj trovas sin en treege malfacilaj kaj malfavoraj cirkonstancoj. Bonvolu ĉi tiun Kristnaskon, dum jarfina libertempo kaj en nova jaro bone pripensu antaŭ ol agi. Konsideru tiujn, kiuj ne povas mem prizorgi sin

### VENTERAĴOJ




: Ja estas konate, ke teroristoj, pere de kaŝitaj bomboj, mortigas arojn da homoj cele timigi kaj senkuraĝigi la ceteran mondon. Tiuj teroristoj - hazarde - eksterlande nomiĝas "porliberec-batalantoj" dum en Britujo, ekzemple, la tieaj batalantoj por libereco nomiĝas "teroristoj"! Mŝdoj, tamen, de tempo al tempo ŝanĝiĝas kaj iuj homoj uzas la bombojn por timigi ankaŭ murdistojn (ne murdantojn). Ĉe Pensacola en Usono dum ĉ. kvaronhoro eksplodis bomboj ĉe tri enurbaj klinikejoj kie oni faras abortigojn kaj laŭleĝe murdas nenaskiĝintajn bebojn. Gismune dise okazis kelkaj dekoj da eksplodoj kaj ekbruligoj ĉe usonaj abortigaj klinikejoj.

: Kaj parolante pri klinikaj aferoj - ĉu nia Redaktoro (kiu, pro sia metio, havas bonan konon pri kuraciloj) ne starigu rubrikon 'Krotonolea Klinikoj' (red. ref. Kancer-Klinikoj)? En tia rubriko oni povus legi pri KK-aj aferoj! Ricinoleo eble ne sufiĉe efikus, sed krotonoleo sendube havus taŭgan efikon ....

(Red. noto: Ricinoleo - *Oleum Ricini* - estas forta laksigilo. Krotonoleo - *Oleum Crotonis* - estas fort-fortega laksigilo de kiu nur kelkaj gutoj povas tiel senakvigi la korpon, ke morto rezultiĝos. Oni ja kredas, ke estas bone purlavi la sistemon per de-tempo-al-tempa laksigo, sed ĉu necesas, ke ĝismorte.....?!?!).

TRILINGVA ARTIKOLO

AFR-ESP-ENG



Esperanto: Por proprigi al si la Esperanto-stilon, ne ekzistas pli bona remedio ol legi kaj relegi bonstilaĵojn verkojn. Kaj fidinda rimedo por kontroli nian stilon estas laŭtlegado. La lango kaj la oreloj estas atentemaj gardistoj, pli severaj ol la nuraj okuloj. Ili tuj rimarkas ĉiujn malglataĵojn en sonoj, frazkonstruo, frazritmo kaj kompreneblo, ĉar la voĉo reliefigas tiujn mankojn. Laŭtlege vian verkaĵon antaŭ ol presigi aŭ publike eldiri ĝin! Zorgu, ke la leganto aŭ la aŭskultanto ne perdu la fadenon pro tio, ke lia atento devas okupi sin pri la lingvo, la stilo, anstataŭ pri la temo! Via stilo estu en harmonio kun la temo kaj formu kun ĝi unu tuton!

Afrikaans: Om die Esperanto styl aan jou toe te eien, bestaan daar geen beter middel as om werke van goeie styl te lees en weer te lees nie. En n betroubare middel om ons styl te kontroleer, is hardop lees. Die tong en die ore is waaksame bewaarders, strenger as loutere oë. Hulle merk onmiddellik alle growighede in klanke, sinkonstruasie, sinritme en verstaanbaarheid, omdat die stem daardie tekortkominge ondersteun. Lees jou werk hardop voordat jy dit druk of in die openbaar opsê. Pasop dat die leser of luisteraar nie die draad verloor omdat sy aandag hom besig moet hou met taal, die styl, instede van met die onderwerp nie! Jou styl moet in harmonie wees met die onderwerp en moet een geheel daarmee vorm!

English: In order to appropriate one's Esperanto style, there is no better remedy than to read and to read again works of good style. And a trustworthy remedy to control our style is reading aloud. The tongue and the ears are careful guards, stricter than the mere eyes. They immediately observe all roughnesses in sound, sentence construction, sentence rhythm and understandability,

because the voice forms those shortcomings. Read your work aloud before printing or publicly voicing it! Take care that the reader or listener does not lose the thread because his attention has to occupy itself with the language, the style, instead of with the subject! Your style must be in harmony with the subject and form one totality with it!

ANONCOJ

: La 46-a Internacia Foiro gastigas ĉiujare 150 firmaojn el 20 landoj, kiuj ekspozicias maŝinojn, instrumentojn kaj aliajn pri fiŝkaptado, fiŝlaboro kaj konservado, krom fakan kampon de markulturado. La Ankona Foiro intencas unuigi spertulojn, produktistojn, komercistojn kaj profesiajn fiŝkaptistojn. Unuafoje en la historio de fakaj foiroj, ĉefa invito estas rezervota al Esperantistaj fakuloj. La inicianto de la Foiro, kiun apogas LF-Koop kaj IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo), kaj sponsoras la Itala Ekstera Komerco Ministerio estas tre grava por la Esperanta komunumo kaj por pruvi, ke la lingvo ekzistas kaj taŭge funkcias por internaciaj rilatoj. Spertuloj el la Tria Mondo povas eĉ vojaĝi senpage al Italio.

: La 22-a Jarkunveno de la Asocio okazos dimanĉon la 23-an de marto 1986. Vidu paĝon 5.


: La plej bonvena artikolo/ero en ĉi tiu revuo estas la via. Kial do ne alsendi ĝin pli regule?

: La unua landa kongreso de SEA okazos en la Jubilea Jaro. Bonvolu ĝustatempe aranĝi por ĉeesti. Por pli da informo kontaktu la Sekretarion (adreso: Bronkhorststraat 75, Groenkloof 0181).

: Personoj, kiuj disponas vortarojn por kiuj ili havas nenian pluan uzon bonvolu sendi al Cobus Zeelie. Li urĝe bezonas vortarojn por sia studentoj. Pro la tre malfavora valoro de la Rando, kosta tro multe mendi novajn de UEA or BEA. Menciuj vian prezon. Cobus planas ankaŭ Esperantosekcion nur malgrandan por la biblioteko

dela teknikono. Se vi disponas kelkajn lerno- aŭ legolibrojn, informu samtempe pri la titoloj kaj prezoj. Kondiĉe de sufiĉa mono, li aĉetos.

: UEA pere de Hans Bakker (kiu respondecas pri Afriko) aranĝis tre interesan konkurson por novaj Esperantistoj en ĉiuj landoj de la kontinento. Ĉi tio estas tre grava ŝanco por ankaŭ la sudafrikanoj partopreni kaj montri al la mondo, ke La Lingvo vivas bone en nia lando. Kursgvidantoj bonvolu igi viajn lernantojn partopreni!!! Rajtas partopreni tiuj, kiuj eklernis Esperanton en la lastaj kvin jaroj. Ni ĉiuj fakte partoprenu per ideoj k.t.p. La limdato estas 1986/02/10. Sendu la artikolojn al: **KONTAKTO-Kurso, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando/Holland.** Jen -



numero de  
**Kontakto**

La temo de *Kontakto* 85/2 estas Afriko. Por ricevi multajn mallongajn artikolojn verkitajn de afrikanoj, ni anoncas konkurson. Rajtas partopreni loĝantoj en la afrika kontinento, kiuj eklernis Esperanton en la lastaj kvin jaroj. Artikoloj estu en bona Esperanto, inter 300 kaj 1000-vortaj, kaj en unu el ĉi tiuj sekcioj:

1. Aspektoj de la vivo en Afriko.
2. Spertoj pri la lernado kaj uzado de Esperanto.
3. Reago el afrika vidpunkto pri kiu ajn temo tuŝita en *Kontakto* en la lastaj jaroj.


La juĝantoj estos H. Bakker, A. Brennan kaj L.G. Nordenstorm. Ni proponos po du premiojn por ĉiu sekcio, ĉiu por elektitaj libroj ĝis la valoro de 50 gld. La juĝantoj rezervas la rajton ne aljuĝi iujn premiojn se ne alvenos sufiĉaj artikoloj. Konkursaĵoj estu skribitaj aŭ tapitaj tre klare.

Limdato: 10a de februaro 86. Sendu viajn artikolojn al "Kontakto"-konkurso, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



1987 ESTAS NUR 12 MONATOJN FOR! NUR PER VIA KUNLABORO POVAS SEA SUKCESIGI LA JUBILEAN JARON ANKAŬ EN SUDAFRIKO. VARBU NOVAJN MEMBROJN POR LA ASOCIO KAJ TIUMANIERE ANKAŬ POR LA E-MOVADO. AKTIVIĜU JAM FRUE EN LA NOVA JARO (1986). V. PAĜOJN 13 16 25 33

34



POR nukleaj armiloj  
aŭ KONTRAŬ nukleaj armiloj...

**TERO-SIMO  
NE!**

por la futuro de l'homaro

apelo al Japanio

Ĉi tiu informo estas originale verkita en Esperanto. Ĉi tiu informo estas originale verkita en Esperanto. Ĉi tiu informo estas originale verkita en Esperanto.

## Esperanto en radio

Ĉiuj informoj pri radio bonvole sendi al la redaktoro de tiu rubriko: s-ro Georges Larchandier, 29 bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

### ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Radio Polonio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.  
11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).  
11.40-11.30 Pekino, 31.64m (9480 kHz), 25.8m (11600 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.  
13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.50m (15385 kHz).  
15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).  
16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).  
19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).  
20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).  
21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).  
22.30-23.00 Pekino, 30.93m (9700 kHz), 26.21 (11445 kHz).

### LUNDE

16.30-16.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

### MERKREDE

01.45-01.55 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.16m (11925 kHz), 24.93m (12035 kHz).  
03.45-03.55 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.60m (15303 kHz).  
07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz).  
10.45-10.55 Berno, 25.43m (11795 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.83m (17830 kHz).  
13.15-13.25 Berno, 25.09m (11955 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.87m (17785 kHz), 16.83m (17830 kHz).

15.15-15.25 Berno, 19.44m (15430 kHz), 17.07m (17570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).  
17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 17.07m (17570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).  
22.00-22.10 Berno, 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.27m (15570 kHz).  
22.45-22.55 Berno, 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.27m (15570 kHz).

### JAŬDE


05.00-05.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), 19.84m (15120 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.  
16.30-16.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

### VENDREDE

18.25-18.30 Pécs, 344m (873 kHz) kaj M.F. 71.81 MHz, 71.03 MHz. Nur en junio, julio, aŭgusto. Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

### SABATE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, Rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.  
16.30-16.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.  
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.  
Berno, diversaj horoj kaj ondolongoj kiel merkrede.



### Aŭskultu kaj reagu

Pasintjare okazis 4 440 Esperantaj radiolensendoj, kiuj daŭris 1 899 horojn. Tio signifas, ke oni ĉiutage povas aŭskulti Esperanton per radio dum preskaŭ kvin horoj. Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konaci, ke tiuj lensendoj dependas de sia populareco de la aŭskultantoj, do skribu foje al radio-stacio!

### DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 31.14m (9635 kHz). O. R. F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.  
09.45-09.57 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz), 19.00-19.10 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz.  
21.45-22.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.  
22.00-22.15 Rio-de-Janeiro, 214m (1400 kHz). Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

### ĜENERALA AŬDEBLECO


Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendojn en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaĵ informoj:

a) Direktitaj ondoj. Berno: je la 01.45h al Centra kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.45h al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45 kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Oriento; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15 kaj 22.00h al Arabio kaj Afriko; je la 22.45h al Suda Ameriko. Pekino: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. Vatikano: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko je la 20.00h. Vieno: 5945 kaj 9635 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.  
b) Nedirektitaj ondoj kaptetblaj longdistanco: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo.  
c) Nur loka aŭskultebleco por Pécs, Rio-de-Janeiro, Sorocaba kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (MF).

: Fulvio Scarpa, FONDoversale 3TR 24/89100, Reggiolalabria, Italio.

: Aĝotai Ede, Ujszász, Korsuth Ut 1, 4-5052 Hungario estas 41-jara agraringeniero kiu interesiĝas pri vojaĝo, bildkartoj kaj Esperantaĵoj.

: Dusio Luigi, Via A. Certosa n. 13, (14100) Asti, Italio estas 65-jara filatelisto.



"...Samaĝa kiel vi.... Vidu la ringojn...!"


LA REDAKCIO DEZIRAS

AL ĈIUJ SIAJ LEGANTOJ


FELIĈAN KRISTNASKON

KAJ

PROSPERAN 1986



SEA



*PC*

ISSN 0006-7024